

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 2-a parto
Claude Gacond, 142-a radioprelego, 1966.06.22 & 1966.06.25

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vi aŭdis la pasintan semajnon pri la graveco de la Nica Kolokvo dediĉita al debatoj pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo. Dank'al la eldono de la laboroj kaj diskutoj okazintaj en tiu kongreso ni povas precizigi nian komprenon pri la disvolviĝo de Unuiĝinta Naciaro kaj de ties fakaj organizaĵoj.

A.- Ni povas retrospektive partopreni la kunsidojn de kongreso, kiu ege riĉigis siajn partoprenantojn.

Cl.- La debatojn malfermis sinjoro René Cassin, prezidanto de la Asocio por la disvolvo de monda juro, tio estas prezidanto de la movado, kiu organizis la kolokvon. De liaj vortoj ni citu :

A.- *« Mi kredas, ke voĉo libera, sendependa, de ĉiuj personoj, kiuj ekparolos ĉi tie kaj interŝanĝos siajn vidpunktojn, povos alporti al la ŝtatestroj kaj al ĉiuj, kiuj havas la respondecon por la organizo de la popoloj sur la tero, modestan helpon, eble eĉ je iuj punktoj novan ideon, kiu ilin helpas por solvi la grandan krizon de Unuiĝinta Naciaro. »*

Cl.- Sinjoro Bargellini, kiu parolis en la nomo de la urbo Nico, faris citaĵon el Lacordaire, kiu bone priskribas la nunan internacian situacion :

A.- *« Inter povrulo kaj riĉulo estas la libereco, kiu premas, kaj la leĝo, kiu protektas. »*

Cl.- Kaj la adjunkta urbestro aldonis :

A.- *« Inter nacioj, kies graveco ekonomia, industria kaj mona malsimilas, necesas, ke la voĉo de la juro aŭdiĝu por kompensi tiujn neegalecojn kaj por ebligi al ĉiuj nacioj sin altigi kaj akiri ekspansion, je kiu ne nur ĉiu homo, sed ĉiu nacio nature rajtas. Necesas, ke juro ebligu ordigi ĉiujn kontestojn, kiuj povas kontraŭstarigi unuj al la aliaj. Kaj tio estas esenca, mi kredas, se ni volas pacon. »*

Cl.- La alta nivelo de tiuj du unuaj intervenoj, de la prezidanto de la invitanta organizaĵo kaj de la estro de la invitanta urbo, donis pozitivan tonon al la debatoj. Oni komprenas, ke registaroj dezirantaj vidi akceliĝi la kreo de internaciaj juraj kutimoj, sendis observanton al tiu kolokvo. Léopold Senghor, prezidanto de la Respubliko Senegalo, mem verkis la mesaĝon, kiun lia reprezentanto devis legi. El tiu teksto ni citu :

A.- *« Viaj kunsidoj, se ili estas duonoficialaj, tamen gravas. Fine estas la ideoj, kiuj kondukas la mondon, kaj manpleno da ideoj, semitaj je taŭga momento, povas pretigi la rikoltojn de la estonto. »*

Cl.- La prezidanto de la Franca Asocio por Unuiĝinta Naciaro kaj franca ambasadoro ĉe UN, sinjoro Guillaume Georges-Picot, prezentis tre riĉan raporton. Se ni havus la tempon, ni tradukus ĝin komplete. Tiu ambasadoro montris, ke ni vivas sub signo de paradoksa kontraŭeco. Sin kontraŭas la fizika leĝo, kiu regas la mondon kaj kondukas al ĉiam pli da solidareco, kaj la politiko de la registaroj, kiu ne agnoskas supernacian solidarecon. Rezultas eksplodiga situacio naskanta perfortemon kaj riskanta konduki al militoj kaj revolucioj. Por tiu ambasadoro sendependeco estas anakronisma dogmo. Li serĉis vojon ebliganta iom post iom fortikigi la mondan solidarecon kaj komprenigi al la registaroj la neceson vere kunlabori al starigo de reala Unuiĝinta Naciaro. Li alvenis je la ideo pri kreo de grupo de raportantoj-negocantoj. Aŭdu liajn dirojn :

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 2-a parto
Claude Gacond, 142-a radioprelego, 1966.06.22 & 1966.06.25

A.- *Nun, sendante siajn delegitojn al Unuiĝinta Naciaro aŭ al fakaj konferencoj aŭ al internaciaj kunvenoj, la registaroj elverŝas sur tiujn kunvenojn sian naciismon, transformas la sekretariejojn kaj asembleojn en resonaj kestoj permesantaj la proklamon de la propraj doktrinoj pri absolutaj suvereneco kaj sendependeco. »*

Cl.- Kiel kuraci tiun situacion sin demandas la ambasadoro. Necesas organizi servon de delegitaro, kiu diskonigu en la registarajn mediojn la vidpunktojn de la internaciaj organizaĵoj, kiu metu la registarojn antaŭ la gravaj problemoj kaŭzataj de ilia doktrino pri absoluta suvereneco. Ni citu lin ankoraŭfoje, iom resume :

A.- *« Kreo de grupoj de raportantoj-negocantoj elektitaj laŭ la iniciato de la ĝenerala sekretario, far la Konsilantaro pri Sekureco kaj la Asembleo, multobligus la funkciojn de la Ĝenerala Sekretario kaj reprezentus delegacion de la Konsilantaro pri Sekureco kaj de la Asembleo. Tiu delegacio prezentus al la registaroj la faktan situacion de Unuiĝinta Naciaro kaj ekzamenus kun ili la vojon kondukebla al internacia kooperado. »*

Cl.- Tiu propono havas la avantaĝon esti efektivebla sen reformo de la Ĉarto. Verŝajne ĝi ne falos en la orelojn de surdulo. Nun ĝin certe jam meditadas sinjoro Thant, kaj subite ni rimarkos ekuzon de tiu ebleco por savi Unuiĝintan Naciaron de ties izoleco kaj por devigi la registarojn plenumi siajn promesojn. Ili ja subskribis tiun Ĉarton, sed de dudek jaroj ili sisteme evitas ĝin aplikadi, precipe koncerne al la internacia kooperado. Kaj nun permesu lastan citaĵon el tiu riĉega parolado :

A.- *« Estas vere paradokse en mondo, kiu elspezas miliardojn por iri foti la kaŝitan facon de la Luno, ke oni ne kapablas trovi kelkajn milionojn por studi kaj efektivigi politikon, kiu kapablu asekuri harmonian disvolviĝon ekonomian kaj socian de la tuta mondo kaj konsekvence kapablu solvi ĉiujn ceterajn gravajn problemojn. »*

Cl.- Kiel mi jam diris, la du unuaj prelegoj metis la kongresanojn antaŭ ties responseco. La interveno de sinjoro Guillaume Georges-Picot metis la Nican Kolokvon antaŭ la realaĵoj. La klimato nun estas favora al bonega laboro. Pri ĝi ni raportos dum la sekvontaj semajnoj. Aŭskultu kaj skribu viajn ideojn. Pere de niaj elsendoj, tiu kolokvo fariĝu nia kolokvo.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-